Bundessekretär *Ständel* hob ferner hervor, daß die Anleitung der Arbeitsgruppen und Zirkel politisch-ideologisch so verbessert werden muß, damit die sich vollziehende Stabilität der Organisation weiter gefestigt wird und qualitativ höhere fachliche Leistungen erzielt werden. Verbesserungsbedürftig sind auch die komplexe Leitungstätigkeit; die Kooperation mit anderen Arbeitsgruppen und Facharbeitsausschüssen des Deutschen Kulturbundes muß zum festen Bestandteil unserer Arbeit werden.

Über die Arbeit der Bezirke Dresden und Rostock berichteten *Walter Röhner* und *Detlev Blanke*.

In der freimütig und offen geführten Diskussion, an der sich 17 Freunde beteiligten, wurden das Referat und die Berichte bestätigt.

Dem Bundesfreund *Rainer Knapp*, der eine andere Aufgabe als Abteilungsleiter innerhalb des Bundessekretariates übernommen hat, wurde der Dank

für seine geleistete Arbeit ausgesprochen und als neuer Sekretär für den Zentralen Arbeitskreis Bundesfreund *Detlev Blanke* bestätigt.
Als neue Mitglieder wurden in den Zentralen Arbeitskreis aufgenommen: *Detlev Blanke, Prof. Falkenhahn. Dr. Ruff, Rudolf Burmeister* und *Linde Heinze.*
In seinem Schlußwort betonte der Vorsitzende des ZAK, Bundesfreund *Rudi Graetz,* daß mit der erweiterten Tagung ein interessanter und nutzbringender Erfahrungsaustausch verbunden war. Kritisch wurde zur vergangenen Arbeit Stellung genommen und Hinweise für die zukünftigen Aufgaben gegeben. Mit Unterstützung des DKB konnten gute Arbeitsergebnisse erzielt werden. Weitere Erfolge in unserer Tätigkeit werden wir erreichen, wenn alle Anwesenden diese Arbeitstagung richtig auswerten und eine zielgerichtete und gut geplante Arbeit geleistet wird.

—mgr—

Esperantisten aus der Hafenstadt TALLIN sandten Glückwünsche zum 750jährigen Jubiläum der Stadt Rostock

Liebe Esperantisten der Stadt Rostock!

Aus Anlaß des bedeutungsvollen Jubiläums Eurer Stadt entbieten wir Euch die aufrichtigsten Glückwünsche.
Wir sowjetischen Esperantisten schätzen sehr die Verdienste der Einwohner der Stadt Rostock im Kampf um die Erhaltung des Friedens für die Völker der Ostseestaaten, in deren Reihen sich auch Esperantisten befinden.
Wir freuen uns, daß die Kontakte zwischen den Esperantisten in Rostock sowie Tallin sich ständig erweitern und sich unsere freundschaftlichen Beziehungen verstärken.
Wir sehen hierin die Realisierung des proletarischen Internationalismus, welcher jetzt mehr denn je notwendig ist für die Erhaltung des Weltfriedens.
Die Ostsee soll ein Meer des Friedens bleiben!
Im Auftrag der Teilnehmer der Mitgliederversammlung der Talliner Esperantisten

Jogulo, 1. Vorsitzender

La 21-an de junio forpasis

SIMONO **CSORA**

el Budapest/Hungario. Li estis redaktoro de „Hungara Fervojista Mondo" kaj ankaŭ iĝis konata en GDR pro siaj ĉeh-metodaj gastlecionoj.
Ĉiuj, kiuj lin konis, memoros lin en alta estimo.

CLR

Neatendite nin atingis amara sciigo pri la forpaso de nia amiko, estro de la Subdistrikta Laborrondo Flöha, kamarado

KURT **POLAN**

Ni devas adiaŭi de sincera homo, kiu pro sia amikeco al Sovetunio longe suferis en faŝistaj koncentrejoj. Per siaj spertoj en la laborista Esperanto-movado li multe kontribuis al nia laboro. Ni neniam forgesos lin kaj daŭrigos lian verkon!

BAK-Esperanto
Karl-Marx-Stadt
ZAK-Esperanto Berlin

INFORMOJ

Blindula gazeto en Esperanto

La Ĝenerala Germana Ligo por Blinduloj eldonos la Esperanto-gazeton „Amikeco", kiu aperos kvaronjare en la Germana Centra Librejo por Blinduloj en Leipzig. La gazeto enhavas artikolojn pri la vivo de la blinduloj en GDR kaj tradukojn el gravaj verkoj de nia nacia literaturo. Mendojn oni direktu rekte al Verlag der Deutschen Zentralbücherei f. Blinde, 701 Leipzig, Gustav-Adolf-Str. 7, Postfach 245. La jara abono kostos 3 germ. markojn. En septembro kaj decembro 1968 aperos provnumeroj, kiujn ĉiu interesito ricevos senpage.

Blindenzeitschrift in Esperanto

Der Allgemeine Deutsche Blinden-Verband der DDR gibt die Esperanto-Zeitschrift „Amikeco" heraus, die vierteljährlich in der Deutschen Zentralbücherei für Blinde in Leipzig erscheint. Die Zeitschrift enthält Beiträge über das Leben der Blinden in der DDR und Übersetzungen aus bedeutenden Werken unserer Nationalliteratur. Bestellungen sind direkt an den Verlag der Deutschen Zentralbücherei f. Blinde, 701 Leipzig, Gustav-Adolf-Str. 7, Postfach 245, zu richten. Das Jahresabonnement beträgt 3,– M. Im September und Dezember erscheinen Probehefte, die an Interessenten kostenlos abgegeben werden.

Mi kore dankas pro la libreto „La Germana Popolo kaj la Unuiĝintaj Nacioj".

La dokumentoj eksterlande ne multe konataj plivastigis mian scion pri la principoj de la ekstera politiko de la Germana Demokratia Respubliko ... Mi kredas, ke ili plene subtenas la justan starpunkton de GDR en ĝia strebado al samrajtigita internacia kunlaboro en la servo de la paco. Mi estas membro de nia Brita Asocio por la Unuiĝintaj Nacioj kaj por mi la demando pri akcepto de GDR havas apartan intereson. La GDR estas jam aktiva membro de pluraj organoj de la UNO (ECE, WMO, WHO) kaj mi firme kredas, ke ĝi plenrajtas kompletan membrecon, ĉar ĝi estas pacama, suverena ŝtato, kiu plenumas ĉiujn kondiĉojn por la membreco de UNO. Ĝia konsekvenca pacpolitiko estas ja klara pruvo de ĝia volo kaj kapablo transpreni kaj konscience plenumi ĉiujn devojn rezultantajn el la Ĉarto.

La ekzisto kaj aparta evoluo depost 19 jaroj de du germanaj ŝtatoj sur la germana teritorio estas fakto, rezultanta el la skismo kontraŭ la volo de la Germana Popolo, kiun efektivigis la okcidentaj potencoj en ligo kun la reakciaj rondoj de Okcidentgermanio. La akcepto de la GDR estos paŝo tre grava por la mondpaco, ĉar ĝi povas ludi gravan rolon en la aferoj de UNO, kies pli grandan universalecon necesigas la fakto, ke la sekurigo de paco estas universala tasko ...

Mi deziras al vi ĉiujn sukcesojn en via laŭdinda laboro.

Donald G., London

INFORMOJ

Ekzamena disertacio pri LEA

La instruisto Diethelm Becker prezentis al la historia instituto de la Universitato Rostock ĝis nun en sia speco unikan ŝtatekzamenan disertacion sub la titolo „La Laborista Esperanto-Asocio sur la vojo al revolucia organizo de de la germana proletaro". Per tradukoj kaj multaj konsiloj la distrikta laborrondo grave subtenis la laboron. La kun la predikato „bona" taksita verko prezentas sur 50 paĝoj, ilustritaj per fotokopioj, bone elektitan kaj funde dokumentitan materialon pri la evoluo de LEA de poresperanta al peresperanta batalasocio. La verkinto de tiu valora studo prezentas per ĝi lerte ordigitan materialon pri ĝis nun preskaŭ neniel esplorita ĉapitro el la historio de la germana proletaro. La intereso flanke de la historia instituto pri tiu temo, grave helpas la esplorplanojn de CLR. Estus tre dezirinde, se ankaŭ aliaj institutoj disdonus esplortemojn pri la menciita temaro. CLR, la distriktaj kaj subdistriktaj laborrondoj certe donus valoran subtenon al la realigo de similaj laboroj.

Examensarbeit über den AEB

Der Lehrer Diethelm *Becker* reichte dem historischen Institut der Universität Rostock eine in ihrer Art bisher einzigartige Staatsexamensarbeit ein unter dem Titel „Der Arbeiter-Esperanto-Bund auf dem Wege zur revolutionären Organisation des deutschen Proletariats". Durch Übersetzungen und viele Ratschläge unterstützte der Bezirksarbeitskreis dieses Werk wesentlich. Die mit dem Prädikat „gut" bewertete Arbeit enthält auf 50 Seiten, illustriert durch Fotokopien, gut ausgewähltes Material über die Entwicklung des AEB von einer Nur-Esperanto-Organisation zum Esperanto-Kampfbund. Der Verfasser dieser wertvollen Examensarbeit übergibt damit geschickt geordnetes Material über ein bisher fast gar nicht erforschtes Kapitel aus der Geschichte des deutschen Proletariats. Das Interesse des historischen Instituts an dieser Thematik unterstützt die Forschungsvorhaben des ZAK wesentlich. Es wäre wünschenswert, wenn auch andere Institute Forschungsthemen zur erwähnten Problematik herausgeben würden. Der ZAK, die Bezirksarbeitskreise und die Kreisarbeitsgruppen gäben sicher wertvolle Hilfe bei der Realisierung solcher Arbeiten.

Blanke

Die polnische Esperantojugend bittet uns mitzuteilen: Vom 26. 12. 68 bis zum 2. 1. 69 findet in Zakopane/Volksrepublik Polen die IV. Internationale Ferienwoche der polnischen Esperantojugend statt. Das Programm beinhaltet neben Ausflügen, Wanderungen und sportlichen Übungen auch Sprachkurse. Interessenten wenden sich bitte direkt an Stanislav Swistak, SZCZECIN, ul. Sopocka 2/2.

Juna esperantisto

Die Jugendseite mußte diesmal wegen der Urlaubszeit ausfallen. In der nächsten Ausgabe wird sie wieder erscheinen.

Der Bulgarische Esperanto-Bund erhielt anläßlich seines 60jährigen Bestehens den bedeutendsten *„Orden für kulturpolitische und dem Volke dienende Arbeit"*, den „Kiril und Metodij-Orden", 1. Klasse.

Kontraŭtalpa Raporto N-ro V

Varmega somero estas malantaŭ mi. La vivo de kontraŭtalpo inter la esperantistoj en GKL estas danĝera. Post la unua raporto mi provis viziti kunvenon esperantistan en D. Sed ...... oni kondamnis min „persona non grata“ kaj mi fuĝe forlasis la verdan sanktejon, en kiu kolektiĝis la kvarpersona grupo. Post la dua miaj leteroj al malnovaj amikoj revenis kun surskribo „ricevanto rifuzas akcepton“. Post la tria oni deklaris min „malamiko de Esperanto“, kio ŝajne por vera samideano estas la plej terura puno.

Kaj nun mi portas malhelajn okulvitrojn kaj ŝanĝigis la harkoloron. Ŝajnigante esti eksterlandano mi bonege ĝuis gastamon kaj malavaran financan subtenon de diversaj laborrondoj. Miajn prelegojn pri la „Principaro de Frostavallen“ kaj „Kontraŭverdismo“ oni entuziasme aklamis.

Ĉio ĉi konvinkis min kaj mi rezignacie cedas la lokon en tiu ĉi gazeto al aliulo, kiu daŭrigos la satiron. Mi cedas, ĉar mi opiniis, ke vunditaj hundoj bojas. Neniu vekrio kaj bojado atingis min. Tio devigas min pensi, ke la talpoj en GDR aŭ surdmutas aŭ ne plu vivas. Ĉu vere niaj rondoj jam spontanee malverdiĝis? Miaj personaj spertoj (vidu supre!) estas aliaj.

Mi hontas batali kontraŭ malsanuloj. Mi adiaŭas, ĉar mi deziras lerni la fingro-lingvon por pli poste kontakti niajn .... „S a m i d e a n o j n“.

Ĝis tiam via KT I

p. s.: Cetere, neniu devigis min adiaŭi. Ĉe ni ne ekzistas kangurupafistoj.

N e k r o l o g o

Eterne flirtos la verda standardo! Profunde funebrante ni adiaŭis nian estimindan kolegon, la portinton de la Granda Verda Meritstelego kun la Majstro-Emblemo, la prezidanton de la Esperanto-Klubo de Subteraj Kavaĵteknikistoj, la fervoran inaŭgurinton de tri Esperanto — necesejoj, la nelacigeblan sulkofosanton, la semanton de verdaj ideoj, nian eminentan s a m i d e a n o n.

TALPO ETMENSUL (1887—1968) kiu neatendite nin ŝokis per sia subita ankoraŭ ne tute kredebla forpaso. Ni kondolencas al la restanta samideanaro.

Kvar samideanoj en D.
Verda batalanto en W.
Esperanto-Müller en O.
kaj du aliaj.

Liaj verdaj pensoj ne mortis.
Li daŭras vivi inter ni !!

———

El la „Proverbaro“ de L. L. Zamenhof:

Avarulo kaj porko estas bonaj post morto.
Du manoj faras ĉion, sed unu nenion.
Ebrieco pasas post dormo, malsaĝeco neniam.
Eĉ malgranda muŝo ne estas sen buŝo.
Barbo potenca sed kapo sensenca.
Barelo malplena sonas plej laute.
Eĉ monstron admiras, kiu ame deliras.
De semo putra venos frukto nenutra.

Por lingva ekzerco

Por multaj esperantistoj la korekta uzo de la transitivaj kaj netransitivaj verboj prezentas certan malfacilon. Sed nur la scio pri la transitiveco aŭ netransitiveco de la verboj garantias la ĝustan aplikon de la sufiksoj —ig— kaj —iĝ—. Per la sekvaj ekzemploj oni povas testi sian scion.

Enskribu nur la mankantajn verbojn!

	TRANSITIVO	*NETRANSITIVO*
1.	Ili *finis* la laboron je la 10a.	Je la 10a la laboro ....
2.	Mi *malhavas* tiun gravan libron.	Tiugrava libro .... al mi.
3.	La fantomo .... lin.	Vidante la fantomon, li *timis*.
4.	La parolado *tedis* lin.	Dum la parolado li ....
5.	La motoro *turnis* la radon.	La rado ....
6.	Dum mallonga tempo ŝi *ŝanĝis* la humoron de gajo al melankolio.	Ŝia humoro .... de gajo al melankolio.
7.	Ŝi *montris* la vizaĝon ĉe la fenestro.	Ŝia vizaĝo .... ĉe la fenestro.
8.	Li *surprizis* min.	Mi ....
9.	Li *naskis* multajn ideojn.	Multaj ideoj .... en lia kapo.
10.	Li *lokis* la kabanon en la arbaro.	La kabano .... en la arbaro.
11.	La rivero .... sian akvon en la maron.	La akvo *fluas* en la maron.
12.	Li *rapidis*.	Li .... siajn paŝojn.
13.	La ĉasistoj *pelis* la bestojn.	La bestoj ....
14.	La tajdo *puŝis* la boaton.	La boato .... en la tajdo.
15.	Li *rompis* la vazon.	La vazo ....
16.	Li *ŝovis* la sledon sur la glacio.	La sledo ....
17.	Li .... sian jakon sur la hoko.	La jako *pendis* sur la hoko.
18.	Li .... grenon.	La greno *kreskas*.
19.	La pasanta aŭto .... lin per koto.	Koto *ŝprucis* sur lin.
20.	La arboj	La vento *skuis* la arbojn.

(Kompilita laŭ „The British Esperantist“, May 1968)

Recenzo

La hungara verkisto Ference Ŝánta skribis sian romanon „Dudek horoj“ en raporta formo. La Corvina-eldonejo presigis la belaspektan 236 paĝan Esperanto-libron bone binditan en formato 9,3 × 16 cm.

Por bone kompreni la libron „Dudek horoj“ la leganto nepre devas scii antaŭe, ke en interesa maniero estas priskribita la vivo en hungara vilaĝo dum la jaroj 1950, 1956 kaj pli poste.

Bedaŭrinde nekompreneblaj vortoj en la teksto malfaciligas la legadon de la plaĉa libro. Sur paĝoj 233/234 ili estas tradukitaj esperanton. Por estontaj eldonoj tial estas rekomendinde, ke la tradukistoj uzu Esperanto-vortojn kaj ne provu enŝovi vortojn, kiuj minimume por germanlingvanoj sonas malagrable.

Malgraŭ tiu ĉi manko la leganto ĝuas la enhavon de la libro, kiu karakterizas la plej novan historion de hungara vilaĝo.

La libro estas havebla en la librovendejo „Karl - Marx - Buchhandlung“, 1017 Berlin, Karl-Marx-Allee 78/84, por la prezo de 9.35 M.

Rudi Graetz

INTERNACIA LINGVO KAJ FILATELO

Esperanto-poŝtstampoj (III)


Austrio

1912	Krakow	8a UK
1924	Wien	16a UK
1936	Wien	28a UK
1947	Kufstein	Austria E-kgr
1949	Graz	Austria E-kgr
1950	Wien	Austria E-kgr
1951	Wien	E-panteono
1951	Innsbruck	Austria E-kgr
1952	Wörgl	Z-monumento
1953	Klagenfurt	Austria E-kgr
1953	Wörgl	9a TEJO-kgr
1954	Wien	Austria E-kgr
1955	Linz	28a SAT-kgr
1958	Wien	Z-monumento
1959	Linz	11a IFEF-kgr
1965	Linz	E-monumento
1965	Wien	E-konferenco

Belgio

1928	Antwerpen	20a UK
1937	Leuven	E-ekspozicio
1947	Mechelen	12a flandra E-kgr
1953	Antwerpen	Beneluksa E-kgr
1961	Gent	34a SAT-kgr
1963	Antwerpen	Jub. benel. E-kgr
1964	Liege	46a nacia E-kgr
1964	Bruxelles	16a IFEF-kgr
1964	Soumagne	46a nacia E-kgr (ronda)
1966	Leuven	48a nacia E-kgr
1967	Charleroi	49a nacia E-kgr
1968	Brüssel	50a nacia E-kgr

Estimataj, bv. forstreki en la listo pri st. de Ĉehoslovakio la tri liniojn post Podebrady 1967. Tiu st. havas saman tekston kiel Podebrady 1966. Novaĵo el CSSR: 1968 Podebrady sama teksto kiel 1966 kaj 1967.



Horizontale: 1. Manĝebla frukto, simila al violenigra frambo; 5. Birdo el ordo de paseroj (R); 8. Instigi per parolo al ia ago aŭ devo (R); 9. Rabobesteto kun bela pelto; 11. Restaĵo el disfalinta konstruo (R); 13. Mensa malsano, karakterizata per timo al malplena spaco (R); 14. Malpura, 16. Antikva greka monereto; 17. Ruĝa elkreskaĵo sur kapo de koko; 22. Vegetaĵo, kies rezino estas laksiga; 23. Internacilingva; 27. Bakita dolĉaĵo (R); 28. Ĝardena pavilonoeto; 29. Ventoli (R); 30. Peco de maŝino (R); 31. Maldika disketo el nefermentinta panpasto.

Vertikale: 1. Arto, aranĝi la sonojn; 2. Malpliigo de prezo; 3. Spicaĵo; 4. Ĉio, kio impresas flarsenton; 5. Bruligebla substanco, kiu estiĝas en marĉoj (R); 6. Abstrakta kvanto, konsiderata kiel la elementa nombro; 7. Meti en posedon de iu; 10. Simila, sama; 12. Longkrura birdo; 15. Cilindroforma kuglego, kiun oni elpafas per kanono; 18. Malutila dentoskraba mamulo; 19. Facile fleksebla; 20. Hakilo kun larĝa klingo; 21. Malplena spaco; 23. Radikalo, kiu kombiniĝas en organikaj komponaĵoj (R); 24. Eŭropa ĉefurbo (R); 25. facile vaporiĝanta fluaĵo, devenanta de efiko de acido sur alkoholo (R); 26. Aŭreolo, prestiĝo (R).

EL LA DISTRIKTOJ

Dresden

La esperantistoj el Dresden sendis leteron al la vjetnamia reprezentanto por la Parizaj interparoloj s-ro Xuan Ty. Ni mallongigite represas ĝin.

„La esperantistoj de la distrikto Dresden en la Germana Demokratia Respubliko sendis al la reprezentanto kaj komisiito de la registraro de USA, Harryman, proteston kontraŭ la hezitigo de pozitivaj konferencrezultoj por la finigo de la kruela milito komencita de la USA-registraro en via ŝatata kaj al ni amikeca lando Vjetnamio. Ni scias, ke via lando pacema, posedas bonajn tradiciojn en la Esperanto-movado.

Ni alte taksas viajn klopodojn rilate al la restarigo de la paco kaj de normalaj vivkondiĉoj por via altestimata popolo, kiu bataldecide, kuraĝege kaj destine turnigis la militokazaĵojn je sia favoro. Ni kondamnas la kriman invadon de la USA-armeo en vian landon, ni kondamnas la bombardadon de via lando pere de USA-aeroplanoj. Estu plencerta, ke ni subtenas vian batalon por la homrajtoj. Ni al vi certigas ke nia tuta simpatio staras je via flanko, ni scias, ke la venko pri la USA-armeo estos via venko. Vivu la venko pri la USA-imperiismo, vivu la batalanta vjetnama popolo, kiu venkocerte iras sian malfacilan sed sukcesplenan vojon al la socialismo.

Ni certigas al vi, ke en la Germana Demokratia Respubliko vi havas bonajn, fidindajn geamikojn, kiuj deziras al vi plenplenan sukceson en viaj intertraktadoj."

Schwerin

En tiu ĉi jaro denove vizitis Bulgarion du esperantistoj el nia urbo, la sinjoroj H. Diedrich kaj J. Thorman. Ili estis invititaj de la Bulgara Esperanto Asocio. En septembro komencis la trian fojon en la popola altlernejo de Schwerin kurso por Esperanto. En la kurso por progresantoj oni komencis traduki la urboplanon de Schwerin kaj la gvidlibron de la urba muzeo.

K. J. Thormann

Rostock

Auf der erweiterten ZAK-Tagung berichtete D. Blanke über einige Probleme der Esperanto-Arbeit im Bezirk Rostock: Vor 3 Jahren begannen in Rostock 3 Esperantisten mit der Arbeit, unter ihnen der unermüdliche 72jährige *Robert Stoll,* der durch seine Tätigkeit immer wieder zeigte, daß die Erfahrungen aus der Arbeiter-Esperanto-Bewegung schöpferisch angewandt auch Erfolge bringen.

Heute arbeiten in den Esperanto Gruppen ca. 100 Esperanto-Freunde. In Rostock konnte man gute Erfahrungen bei einer gut organisierten und seriösen Vortragstätigkeit sammeln. So wurde das Interesse für Esperanto geweckt. Dadurch war es bisher immer möglich, Anfängerkurse mit 35 - 40 Interessenten zu beginnen. Etwa 40—50 % blieben in den Kursen, die durch den außerordentlich aktiven Bundesfreund *Werner Plate* vielseitig und dynamisch geleitet werden. Ein ernstes Problem liegt allerdings in der Tatsache, daß nach der Sommerpause die Beteiligung an den Klubabenden geringer wird. Die Rostocker versuchen diesem „Schwund" durch eine kontinuierliche Leitungstätigkeit zu begegnen. Alle Leitungsmitglieder haben konkrete Aufgaben erhalten. Ihnen wird

für die monatliche Leitungssitzung die Tagesordnung zugesandt.

Ein Protokoll wird angefertigt und die Beschlüsse regelmäßig kontrolliert. Da die Kreisleitung des DKB monatliche Berichte erhält, ist sie in der Lage, die Arbeit der Esperanto-Freunde konkret einzuschätzen und entsprechend zu unterstützen. Eine weitere Rostocker Erfahrung ist, daß Anfänger, die in Szeged ernsthaft gearbeitet haben, sogar in der Lage sind, neue Kurse zu übernehmen. So werden die Kurse in Bad Doberan und in Rostock von Bundesfreunden geleitet, die erst seit etwa 2 Jahren Esperanto lernen.
In Rostock haben sich 3 Schaukästen (ein sehr gut beleuchteter im Hauptbahnhof) als gute Werbeeinrichtungen erwiesen. *—e*

Observoj en Zittaŭ

Tre laŭdinda estas publika laboro de la Subdistrikta Laborrondo Zittaŭ. Vizitinte la urbon Zittaŭ por malmultaj horoj, sur „Marktplatz" mi vidis homojn, rigardante vitrinon. Alirinte mi legis sur la vitrino la vorton „Esperanto" grandlitere. En la kesto mi vidis fotojn pri la laboro de la klubo. Sub ĉiu foto troviĝis klariga teksto, krome la monata programo de la Subdistrikta Laborrondo kun temoj, datoj kaj loko. Tiamaniere fremdulo ĉiutempe facile povas kontakti la Esperanto-klubon. Sed en la vitrino ankaŭ estas troveblaj la adreso de la Kulturligo kaj aliaj necesaj adresoj. Ĉio aranĝita laŭ plaĉa maniero, tiel ke ĝi nepre estu propaganda por homoj, kiuj ĝis nun ne konatiĝis kun la Internacia Lingvo.

Pluirinte tra la stratoj de Zittaŭ, en la domo de „Kulturzentrum" mi subite ekvidis grandan montrofenestron, varbante por Esperanto. En ĝi mi vidis multajn interesajn afiŝojn manpentritajn, esperantaĵojn ktp. Per tiu ĉi laboroj niaj amikoj en Zittaŭ montras, kiamaniere grupo aŭ laborrondo povas agadi aktive ankaŭ dum la somera tempo, renovigante regule la keston per monata programo kaj novaj fotoj. Nian gratulon pro tiu ĉi modela somera aktiveco. Sed mi trovis en la granda montrofenestro ankaŭ gravan mankon. Ne estis videblaj niaj lernolibro kaj vortaro, eĉ ne unu de la libroj el Hungario, Pollando kaj Vjetnamio, kiuj estas haveblaj en la librovendejo „Karl-Marx-Buchhandlung", Berlin. Same mankis la gazetoj „Hungara Vivo", „Nuntempa Bulgario" kpt., aboneblaj ĉe la librovendejo „Das sowjetische Buch" en Berlin. Feriante en Oybin, mi memkompreneble ankaŭ vizitis unu el la klubvesperoj en Zittaŭ. Dum tiu ĉi vespero ni diskutis pri multaj problemoj de nia komuna laboro. Certe ankaŭ en aliaj lokoj ĉirkaŭ Zittaŭ baldaŭ maturiĝos la kondiĉoj por fondi kursojn. La Zittaŭ-anoj certe helpos.

Rudi Graetz

Schwerin

La 28-an de Junio kunvenis 11 partoprenintoj de la unua en GDR Esperanto-kurso ĉe Popola Altlernejo por festete fini la kurson. La instruisto s-ro A. Stechert ricevis florbukedon kiel danko de la gekursanoj.

Ĝaja rondo, en kiu oni ankaŭ kantis en la kurso lernitajn esperantajn kantojn, iĝis la lasta instruhoro. En la Klubdomo de la Germana Kulturligo ek de septembro la kursfinintoj estonte regule kunvenos por pluekzercadi la lingvon.

La eksterlandaj geamikoj estas petataj sendi korespondproponojn al Esperanto-rondo ĉe Deutscher Kulturbund, 27 Schwerin, Wilhelm-Pieck-Straße 8, DDR.

Dr. Zamenhof pri novaj vortoj

„...Naciajn idiotismojn, kiuj ne prezentas necesaĵon, ni devas kompreneble eviti kaj ni devas peni traduki ilian sencon en maniero plej logika kaj internacia; sed tiajn esprimojn, kiujn ĉiu lingvo nepre devas posedi, ni devas peni en tiu aŭ alia maniero nepre traduki, sed ne simple eviti ilin, pro timo, ke nia esprimo eble ne plaĉos al la legantoj aŭ ne ĉiuj ĝin tuj bone komprenos. Unu el la plej ĉefaj taskoj de niaj verkistoj devas esti la ellaborado de la lingvo: tiel, se ia esprimo, kiun ne ĉiuj tuj komprenas (ekzemple: ‚elrigardi', ‚subaĉeti' k. t. p.) ŝajnas al ili nebona, ili devas peni anstataŭigi ĝin per esprimo pli bona: sed se ili, por ne malbeligi sian stilon, simple evitos tiajn frazojn, ili faros al nia lingvo tre malbonan servon. Kompreneble, en ĉi tio, kiel en ĉio alia, devas esti observata la deca mezuro. **Ne tro krude, ne tro multe per unu fojo!** Novaj esprimoj devas esti enkondukataj nur **iom post iom**, nerimarkeble. Krom tio ni devas memori, ke nia lingvo devas servi ne sole por dokumentoj kaj kontraktoj, sed ankaŭ por la vivo; tial ofte (precipe en viaj dramaj dialogoj) pli bona estas frazo ne tute logika kaj ne perfekte preciza, sed mallonga kaj viva, ol frazo perfekte preciza, sed mallonga kaj viva, ol frazo perfekte preciza, sed enuige peza kaj tro kabineta."

Respondo 25 de d-ro Zamenhof
„La Revuo", 1907, Oktobro

La malbona gramatikisto

Berlinano, kiu laboris en Dresden, havis — kiel ĉiuj Berlinanoj — tre malbonajn konojn pri gramatiko. Pro tio li klopodis lerni la gramatikajn regulojn de klera Dresdenano. Tiu ĉi ankaŭ devis akompani lin dum promenadoj kaj atentigi lin pri lingvaj eraroj dum la konversacio. Iam sinjoro salutis, kaj la Berlinano demandis: „Ĉu la sinjoro salutis al mi?" La Dresdenano korektis: „Min." La Berlinano daŭrigis: „Do la sinjoro salutis al vi!" Ree la Dresdenano korektis: „Vin!" Nun la Berlinano elvokis: „Do la sinjoro efektive saluti al mi!"

La trovo de Ameriko

Profesoro V. eliris el sia vagono por trinki glason da biero en la stacia restoracio. Por povi retrovi sian vagonon li rigardis al la vagona numero. Ĝi estas 1492. „En tiu jaro Kristofo Kolombo trovis Amerikon", diris al si la profesoro kaj opiniis, ke laŭ la memorteknika metodo li facile retenos la nombron en sia memoro. Kiam li revenis el la restoracio, la vagonaro jam ekmoviĝis. Pro la granda ekscititeco li forgesis la nombron kaj kuradis antaŭen kaj reen apud la forveturanta trajno kriadante: „Konduktoro kiam Kristofo Kolombo trovis Amerikon?"

Noto de la redakcio:

Preseraro enŝteliĝis en la poemon „Neniam plu militon" de G. B. Berczessi (d. e. Nro 22/23, pĝ. 7). La dua strofo devas teksti:

> Mi ne komprenis, ke ĉio ĉi
> kial estas aŭ kial devas esti,
> mi rigardis demande mian patrinon,
> kaj ŝi,
> mute brakis min, al sia koro.

Ni pardonpetas pro la eraro.

Herausgeber: Deutscher Kulturbund

(Zentraler Arbeitskreis Esperanto der DDR). Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstraße 60. Fernruf: 22 59 91.

Verantwortl. Redakteur: Eugen Menger, Redaktionskommission: Otto Bäßler, Hans Eichhorn, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Rainer Knapp, Erwin Schleusener, Willi Vildebrand. — Veröffentlicht unter der Lizenznummer 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. Erscheinungsweise: 6mal im Jahr.

Preis pro Einzelheft 30 Pf.

Druck: Druckwerkstätte Glauchau KG

KORESPONDDEZIROJ

Bulgario

Hristo Ivanow kaj **Dimitscho N. Magarov** (tradukisto), **Loveĉ,** Karpatschev 22, deziras korespondi pri lingvaj problemoj, Esperanto, germana, rusa, franca.

GDR

Korespondon pri modernaj formoj de adoleskigo (koncernaj ceremonioj) en diversaj landoj deziras **Rudolf Hahlbohm,** Kreisausschuß für Jugendweihe, Berlin-Weißensee, Falkenberger Straße 183.

Pollando

45-jara instruisto, interesiĝanta pri muziko kaj pedagogiaj problemoj, kolektas diskojn kun popola kaj serioza muzikoj, dez. korespondi tutmonde, **Tadeusz Turkowski, Elk, str. Wojska Polskiego 42/9.**

19-jara teknikisto, interesiĝanta pri literaturo, geografio, junularaj problemoj, sporto, turismo, kolektas bildkartojn kaj diskojn, **Jan Romaniuk, Bykowce 82, p-ta Zatuz, pow. Sanok, woj. Rzeszow.**

Deziras korespondi blinda pola amiko per „Deutsche Blindenschrift" kaj Esperanto, **Josef Roginski, Lubin, Pstrowskiego 4/16 woj Wroclow/Pollando.**

Wasylow Grzegorz, Legajuy 42 apud Olsztyn, deziras korespondi kun amikoj en GDR.

Svedio

Profesia muzikisto (blokfluta instruisto kaj trombonisto) 37-jara, volas korespondi nur kun muzikemuloj el GDR. **Bertil Englund,** Branteviksa 12 C, II, **S-2/44/Malmö Sö.**

Skribas la legantoj...

„...Koran dankon por via propagando de germana-soveta amikeco pere de Esperanto.

Mi, mineja inĝeniero korespondis inter 1931—1932 kun germanaj esperantistoj. Bedaŭrinde en la fajro de la pasinta milito pereis la adresoj de miaj ekskorespondantoj.

Eble iu el ili nun loĝas en GDR Ili bonvolu denove kontakti kun sia soveta amiko **Lev Fiŝbejn, Uzlovaja, Tulskoj obl. ul. Gagarina 72/10 USSR.**

Sovetunio

Studentinoj de la fremdlingva fakultato deziras korespondi en Esperanto, franca kaj angla.

Pro novfondiĝo de Internacia Klubo sendu krome amase salutojn. Por ambaŭ jena adreso **Ped. Institut Klub internacionalnoj drujbi, sekcia Esperanto, Zaporoje-2,** ul. Ĵukovskogo 60, Ukrainio.

Juna soveta esperantisto deziras korespondi kun fremdaj landoj pri muziko k. aliaj temoj. **V. Tonkiĥ,** 10. juĵnaja 26—77, **Ivanovo — 13, Sovetunio.**

Ni deziras aranĝadi vesperojn pri diversaj landoj kaj urboj de la mondo. Al tiuj E-kluboj, kiuj sendos la materialon, ni sendos la reciprokan/fotojn, prospektojn, revuojn, librojn, sondiskojn k. t. p. / pri Litovio, ĝia ĉefurbo Vilnjus, litova popolo mem.

Krome, kvardek 17-28-jaraj geklubanoj / studentoj, inĝenieroj, oficistoj, laboristoj / dez. korespondi tutmonde. Temoj: sociaj eventoj, arto, literaturo, kemio, radiotekniko, modoj, modernaj kaj popola kantoj, popolaj moroj, turismo.

Junulara Esperanto klubo „Juneco", a/d 61, **VILNIUS-C,** Litovio, USSR.